



LINGVO INTERNACIA

MONATA GAZETO POR LA LINGVO ESPERANTO.

Kosto de abono por jaro: Skandinavaj kronoj 4,00 = hungaraj kronoj 5,50 = frankoj 5,75 = rubloj 2,00 = germanaj markoj 4,50 = portugalaĵaj rejsoj 1200 = brazilaj rejsoj 2500 = dolaroj 1,25 = ŝilingoj 4 1/2.

Pago por anoncoj: 15 oeroj = 20 heleroj = 20 centimoj = 8 kopekoj = 15 pfenigoj por duonpaĝa petitlinio. — 10% rabato por duonjara, 25% rabato por tutjara anoncado; ĉe granda anoncado ankoraŭ pli da rabato laŭ reciproka konsento.

Adreso de l' redakcio: **Paul Nylén**, en la redakcio de »Vårt Land«, **Stockholm**, Sverige (Svedujo). — Adreso de l' administracio: **Paul de Lengyel**, en **Szegvár**, Magyarország (Hungarujo). — Kun manuskriptoj kaj ĉio tuŝanta la tekston oni sin turnu al la **redaktoro**; pri abono, ekspedado, anoncoj kaj ĉiuj monaj aferoj oni devas turni sin al la **administranto**.

Progreso aŭ ... regreso?

En n-ro 10—11 de tiu ĉi gazeto »malnova kaj fervora esperantisto«, sinjorino Proĥoroviĉ-Koĉmarenko, komunikas al ni ke ŝi sentas »akran ĉagrenon«, kian staton, vere, ankaŭ la artikolo de ŝi sufiĉe klare atestas. Ŝi konstatas ke nia gazeto mortis, rakontas ke ĉiu nova kajero de ĝi estas pli kaj pli malinteresa por ŝi, sin turnas kun gesto de sublima malestimo al la kunlaborantoj de L. I., la »esperantistoj tute nekonataj, ĉe kiuj eĉ sub mikroskopo estas maleble trovi fajron da talento,« ŝi sopiras pri la malnova bona tempo, kiam ŝi »povis legi efektive seriozajn artikolojn«, ŝi ĉagreniĝas ke ŝi »devas legi fabelojn pri tio, kiel elkreskis rostro ĉe elefantido« (mi konstatas, dume, ke ŝi ne vidigas ĉagrenon pro tio, »kion la krokodilo prenis por tagmanĝo« !), kun honto ŝi devas konfesi »ke nia literaturo nun ... regresas« kaj eldiras la konvinkon ke »sendube baldaŭ L. I. tute ĉesos sian ekzistadon« kaj supozas, ke kun ĝi »mor-

tos nia afero mem« k. t. p. k. t. p., kaj ŝi finas per alvoko al talentoj savi la alie pereantan aferon esperantan.

Kiel ĝenerala respondo al tiu ĉi artikolo — ne al la alpersonaj atakoj en ĝi, kiujn mi rekomendas al ŝi relegi kiam ŝi iam estos elĉagreniĝinta kaj trankviliĝinta — mi petas komence citi eldiron de esperanta aŭtoro, kies talenton kaj aŭtoritaton eble eĉ sinjorino Proĥoroviĉ-Koĉmarenko trovas inda je konfeso: doktoro Zamenhof en »Esperantisto« 1892:

»Ni iras antaŭen regule. La celo lumas al ni ĉiam tiu sama, kaj, ĉu hodiaŭ la cirkonstancoj estas pli favoraj, morgaŭ — malpli kaj postmorgaŭ denove pli — la veraj amikoj de nia ideo laboras* trankvile kaj kun egala animo«.

Kion do faris la »fervora« esperantistino Proĥoroviĉ-Koĉmarenko por la progresigo de nia sankta ideo?

Ŝi *abonadis* nian centran organon!
Talento!

* Substreko de la citanto.

Ĉu efektive la genio kaj talento estas la motoroj de la progresado ?

La plej grandaj rezultatoj en la homa vivo estas ordinare atingataj per treege simplaj rimedoj. Tio ĉi estas fakto rimarkinda. Tiuj, kiuj estas plej persistaj kaj estas »fervoraj« ne nur en la koro, sed ankaŭ en siaj »agoj«, ordinare portas hejmen la venkopalmon. Kio alia estas la genio kaj talento ol diligenteco kaj persisteco ? Ni nur rigardu per la naturaj okuloj la praktikan vivon, kaj ni trovos ke la prospero, la estonteco, la feliĉo apartenas al la diligentaj kaj persistaj homoj.

Genio kaj talento havas ja sian gravan indon, sed kion ili povas fari, se ilin ne portas sur siaj larĝaj dorsoj la diligenteco kaj persisteco. »Kio alia estas la genio,« diras J. Foster, »ol la kapableco ekfajrigi en sia interno ?« Kaj alia filozofo diras ke »genio estas la povo sin streĉi.« Jes, la eminenta Buffon samigas la genion kun la pacienco.

Isak Newton, iam aldemandita kiel li povis fari tiomegajn kaj grandajn elpenaĵojn, respondis : »mi persiste pensadis ilin.« Kaj kiam li ĉe la fino de sia vivo rerigardis al la rezultato, li diris malfiere : »se mi estas farinta al la homaro ian servon, ĝi dependas nur de diligenteco kaj elpersista pensado.«

»La genio estas nenio,« opinias Voltaire. — »Ĉio dependas de diligenteco kaj persisteco.« Jes, Beccario eĉ insistis, ke estus eble por ĉiu ajn fariĝi poeto, nur se oni estus persista.« Troaĵo, ja ! Kaj tamen, kio estus ĉiuj donacoj de la naturo, kiam ne ekzistas la interna forto, kiu devas instigi la entreprenon !

»Iru al la formiko vi, maldiligentulo, kaj eksaĝigu !« diras Salomo. Ekrigardu tiujn ĉi etulojn ! Ĉu vi povas vidi ilian talenton sub mikroskopo ? Ni simulu ilin ! Ni laboru kaj esperu ! Kion pli, se oni nin mokas pro manko de talento !

La esperantismo similas al fajro, kiu disvastiĝas super la tutan teron. Ĉie kie la ho-

moj kunvenas, tie ĝi brulas, jen kiel fajrero, jen kiel flamo. Kaj ĝiaj laboristoj : homoj kaj hometoj, talentuloj kaj sentalentuloj, portadas materialon al la brullignaroj, ĉiu laŭ sia povo kaj sia naturo. Kaj flamo ekkreskiĝas ĉe flamo en ŝanĝiĝantaj koloroj, transformigante kaj renovigante. Kaj tiuj, kiuj ekbruligas la lignarojn, mem kunbrulas jen kiel malforta mikroskopa fajrereto, jen kiel ĉielen etendiĝanta flamo. Sed ili vivas, kunvivas.

Sed ne ĉiuj estas tiel feliĉaj.

Ekzistas ia speco da strangaj homoj, kiuj de la sorto estas juĝitaj vagi solaj inter la brulantaj lignaroj, rigardante la fajrojn, kiujn *aliaj* ekbruligis. Ili frotas siajn malvarmajn manojn, varmiĝas siajn dorsojn ĉe la vivigantaj flamoj, jen ĝuante, jen kritikante. Unu revigiĝas antaŭ ekheliĝanta kolorŝanĝiĝo, alia rigardas kun ĝemo estingiĝantan brulaĵon, tria grimacas kaŭze de la naŭziganta lin fumo de freŝaj branĉoj, kiu, densiĝante ĉirkaŭ lia kapo, malhelpas lin rigardi super la kampon. Ilia misio estas nefaro. Envolvigu vin zorge per via ĝispieda mantelo, ke ne makuligu vin la karbo kaj fulgo !

Sed la aliaj vivas.

Kaj la flamoj disvastigas sian regnon pluen kaj pluen, tagon post tago, jaron post jaro, en grandaj ondoj foren super la homarujon. La nevidebla fajrero kaj fumanta brulaĵo kreas belajn ĉielealtajn flamojn.

Por Esperanto pro Esperanto !

P. Ahlberg.



PENSETOJ

pri la letero de sinjorino Proĥoroviĉ-Koĉmarenko
en n-ro 10—11 de L. I. 1900.

Ne dividante la rigardojn kaj kondamnojn de tiu ĉi letero, mi tamen estis kontenta renkonti ĝin en L. I.

Ĝi, kvankam pro ne tre justaj motivoj, enportas kelkan militeman ekon en la paĝoj tro pacaj de nia ĵurnalo, enverŝas polemikan flueton, ne senutilan en la afero, kies partoprenantoj nature disiĝas en iliaj opinioj.

La redakcio de L. I. jam donis al la letero bone motivigitan reparolon.* Ĝi montris ke ne oportunas al iu, ne tre bone filologie armita, enĵetiĝi kun propra legaro tien, kie voĉrajto apartenas al multaj kaj multaj reprezentantoj; ke ne estas justa por mi postuli ke ĉiu homo purigu sian nazon je tiu sama ma-

* Por niaj nove aliĝintaj abonantoj ni represas tie ĉi ankaŭ la diratan reparolon, presitan senpere post la artikolo de s-rino P.-K. en la n-ro 10—11 de L. I. 1900:

»**Rimarko de la Redakcio.** Ni ne volas rifuzi al ni la plezuron fari unu kaj alian rimarkon kaŭze de la diroj, kiujn faris en sia letero la estimata kaj alte ŝatata aŭtorino. Ĉiu afero homa havas du flankojn, unu bonan, unu alian nebonan. La alia flanko de nia gazeto estas ĝiaj mankoj, el kiuj ĝi havas multajn. — Sed nia gazeto posedas unu grandegan meriton: ĝi ekzistas. — Tiuj, kiuj mem donis iom da sia tempo al la propagando esperantista kaj speciale al la gazeto, povos kompreni, ke, se oni akcelas nur sian grandan plezuron, oni baldaŭ laciĝos. La nuna redaktoro certe ne laciĝis je tiu ĉi laboro, sed li havas ankaŭ aliajn devojn, alian laboron, kiuj konsumas liajn fortojn kaj okupadas lian tempon. Li tamen faris kaj faras ĉion, kion li povas: li donis la denaron de la vidvino. Ĉu tio estas tro malmulte? — Oni diras, ke la gazeto mortis! Kaj tion ĉi oni diras per viva voĉo en la vivanta gazeto mem! Ni havas grandan respekton por la vivo kaj la morto, kaj ne ekzekutas facilanime ekzistojn ian. Tian saman respekton ni postulas de la flanko de niaj kunhomoj. — La estimata kritikantino ne vidas talenton ĉe la nunaj kunlaborantoj en L. I. Tion ĉi ni ne povas helpi. Eble ŝi mem povos pli bone kaj pli komprene vidi, se ŝi formetu la mikroskopon kaj rigardu per siaj naturaj okuloj. Se oni volas vidi homon, kaj tutan homon, la mikroskopo absolute ne estas la ĝusta instrumento. — Ni miras, ke eĉ ne taŭgas unu el la plej gloraj verkistoj de la nuntempo — Rudyard Kipling . . . — La malpia perlo »sen ke li povus« estas nek malpia, ĉar ĝi estas tute indiferenta de la religio, nek perlo, ĉar ĝi estas nur ordinara pinglo por praktike kunfortikigi du frazojn unu kun la alia. Oni diras tion ĉi france: *sans qu' il pût*, italie: *senza ch' egli potesse*, hispane: *sin que él pudiese*, germane: *ohne dass er könnte*, svede: *utan att han kunde*, hungare: *a nélkül hogy tudná*. — Eble la rebusoj povus esti pli sagacaj, sed ankaŭ la infanecaj aferoj havas sian intereson. Vidu en la Evangelio. (Mateo, ĉapitron 18: 3.) — Pri tio, kio estas dirita pri la evitindeco de reklamo, ni tute konsentas, konvinkitaj, ke la esperantistoj devas ĉiam agi per la plej granda mezuro da seriozeco kaj gardemeco en la propagando. La redakcio.«

niero kiu estas eca al mi; kaj ke por lingvo neŭtrala, al ĉiu apartenanta, kies difino (kaj granda merito) estas servi je *trafareto* (angle — *stencil*; france — *dessin à jour*)* por plej diversaj naciaj lingvoj, kies formoj eĉ ne estas (feliĉe!) malmoligitaj, por tiu lingvo ja estas natura kaj neevitebla lasi trafali la diversajn apartecojn de tiuj lingvoj . . . Por kio esti kaprica? Oni ne povas dubi ke s-rino P.-K. malgraŭ ŝia stila ofendiĝemeco, bonege komprenis la kulpigatan »sen ke li . . .« des pli ke ŝia propra patrolingvo plene leĝigas tian esprimon (*bez tego ĉtob on . . .*). Nur sub influo de malbona humoro oni povas ridindigi similajn apartecojn de siaj kolegoj. Por mi, ekzemple, la esprimo »por ke havi . . .« en la mema, dirata letero ŝajnas malpli rajtita . . . Sed oni ne povas postuli de ĉiu stilon de s-ro *de Beaufront*; en Esperanto ĉiu logike konsideranta estos prava. Do lasu ni al ĉiu uzi »ordinarajn pinglojn« por sia vestaĵo laŭ lia bona volo, nur ke ili ne pinglu maskojn nepenetreblajn. La tolereco estas ja ĉiam rekomendinda.

La konfirmo de s-rino P.-K. pri nuna malleviĝo de la nivelo de indeco de nia ĵurnalo ne povas esti neigata. Sed kie estas la kaŭzoj de tiu malleviĝo? Ĉu mi povas fari respondebla je tio la redakcion? Ĉu ni traktos la *literaturan* indecon de L. I.? Ho ne! La historietoj nun plenigantaj la ĵurnalon estas proksimeme tiaj samaj kiel estis antaŭaj. Kun s-rino P.-K. mi bedaŭras ne renkonti sur la paĝoj de L. I. la nomojn de antaŭaj batalantoj de la esperantismo, kaj kun vera ĝojo resalutus ilin tie: sed moŝtigi ilin kiel »lumiloj« kompare kun nunaj skribantoj de L. I., kiujn s-rino traktas pigmeoj, oni povas nur perdinte ian veran mezurilon. La diferenco estis kredeble rigardita sub la mikroskopo citita en la letero.

* Ŝablono.

La redaktorado de s-ro L. Zamenhof estis la printempo de la esperantismo. Oni disputadis la poveblecon de ŝanĝoj kaj pliboniĝoj de la lingvo internacia. Ĉiu kajero estis nature atendata kun ega nepacienco. Pli malfrue ja, demando de tre modesta graveco pri skribado de nomoj propraj levis la pasiojn eĉ super la nivelo dezirebla. Ĉu en nuna tempo la traktado pri verbigiloj ne estas ankaŭ tre interesa? Se similaj demandoj ne estis forprenitaj de la paĝoj de la ĵurnalo Esperanta, povas esti ke ni havus nun nian lingvon senigita de makuletoj kiuj ĝin malornamas, liberigita de katenoj de formo iam ŝarĝaj. S-ro Zamenhof malfermis ankaŭ nian ĵurnalon al aliaj demandoj de komuna graveco, sed forgesis konformiĝi en tiu ujo kun la gustoj de la rusa administraro. Je lokigo de letero de fama moralisto lia ĵurnalo estis tuj ekbatita per la dirita administraro, kaj nova redakcio invitis nin al moreco pli singardema . . . Tio estis periodo de noveco kaj prozelitismo. Sed la tempo pasadis estingante la lumilojn de s-rino P.-K. kaj malvarmigante nian propran varmon kaj intereson al nia afero, kaj nia nuna ĵurnalo spegule reflektis la situacion. Ekiris historietoj. Sed kion volas vi ke faru la redakcio de la gazeto kiam la vivo Esperanta letargias? Kie estas Esperantaj projektoj, vojaĝoj, kunvenoj, — kie estas fine bonaj vortaroj Esperantaj? Estas neduba ke tiun ĉi meman senagecon de nia vivo montras la redakcio de L. I. en ĝia respondo al s-rino P.-K. kun la aludo, ke ĉe tia situacio la sola fakto de ekzistado de la ĵurnalo jam konsistigas meriton. Tiun ĉi meriton ni devas dankeme konfesi.

Tiuj el ni, kiuj opinias la esperantismen esti ilia propra afero, devas memori ke la tempo de prozelitismo ankoraŭ ne foriris; ke Esperanto, kiel kreskaĵo ankoraŭ ne fortikiĝinta, bezonas kelkan flegon kaj atenton. Ĉiu el tiuj »fervoraj« Esperantanoj devas rigardi sin kiel kunlaboranto, ne nur abonanto, de la gazeto

Esperanta. Postuli ke oni devu prezenti al mi tute preparite tion, pri kio mi mem devas zorgi — estas pretendo iom de rusa deveno. En kio estas kulpa la redakcio de L. I. se la esperantistoj mem ne faras farojn Esperantajn * kaj ne avizas pri ili. Tamen io estas por fari. Kelkaj el esperindaj esperantanoj foriĝis nun en malproksima Azio. Ĉu ne estas loganta la penso: transjeti Esperanton en Japanujo kaj Ĥinujo? . . .

Se tio okazos, oni povus zorgadi pri historietoj. S-rino P.-K. pensas ke nun la laborado en la literaturo Esperanta povas fari multon por la antaŭeniro de la lingvo internacia. Mi ne dividas tiun opinion. Mi ĉiam pensis ke nia gazeto ne devu esti materialo por facila legado ke historietoj devu konsistigi nur ĝian tre malgrandetan aldonon, kaj mi rigardadis ilin je sufiĉe indiferenta okulo. Mi ĉiam konsideris ke la granda facileco de trafaretaĵo en Esperanto (en kio ĝuste konsistas genia merito de la sistemo) povas, en ĉiu dezirata tempo, eknaski grandegan nombron da tradukoj kaj tradukantoj tuj kiam aperos demandaĵo je ili. Nun ja tiu demandaĵo mankas kaj mankas. Kiel belaj ajn povas esti la tradukoj aperantaj, mi multe dubas ke ili estas bone aĉetataj kaj ankoraŭ malpli legataj. Multaĵo da ni suferas pro multego, ne pro manko de legado, kaj ne legadamo, ne literatura emo igas homojn tiri sin al Esperanto. Tamen tio estas mia persona opinio ne unue eldirata, kaj p. e. mi eraras transportante ĝin sur multaĵo de kunanoj. Esperantistoj ja ne estas homoj de sama koloro, kaj male: la difino de la Esperantismo estas enpreni homojn de ĉiuj koloroj. Fine la historietoj havas ankaŭ sian bonan flankon: ili fortikigas la ligan kun Esperanto de . . . tiuj kiuj ilin skribas. Tial mi rigardas kiel devon aboni ĉion kion oni eldonas Esperante.

* Por Francujo — escepto. Tie agantoj, kiel s-roj de Beaufront kaj Ch. Méray ne lasas dormeti nian aferon; tie Esperanto iras je bona iro.

Mi nek dividas la malemon de multaj personoj al reklamo Esperanta. Estas neduba ke, kiel starigas s-ro Rakitski, nombrego da homoj eĉ nenion aŭdis pri Esperanto. Reklamo certe ne taŭgas tiom kiel gazeta artikolo, publika parolado, rimedoj pli efektivaj kaj malpli alireblaj, sed mi ne komprenas kio povas esti de peka en reklamo. Esperanto estas kune ilo kaj stimulo por komunikoj internaciaj, kaj kiel tia ĝi povas rajte ĉie esti ekspoziciata. Eĉ en tia vesto ĝi altiras al ni ne amatulojn de literaturo, sed personojn emantajn al kosmopolita vasto, homojn avidantajn la kampon de tut-homareco. Tiuj ĉi estas niaj parencoj je spirito, »naturaj esperantistoj« kiel nomas ilin s-ro Rakitski, kaj serĉi tiajn homojn oni kuraĝe povas eĉ kun reklamaj lanternoj. Sed mi pensas ke tiu elekto, tiu parenceco en spirito neniel donas al ni la rajton nomi tiujn kiuj ne interesiĝas je nia afero »dupiedaj bestoj« kaj egaligi la indiferentan al ni homaron kun »porko kuŝanta en koto« kiel konfirmigis unu antaŭata artikolo de nia gazeto. Por fari tiajn riskajn ekcertigojn * oni devas per si mem ege altiĝi super la nivelo de la homaro, aŭ esti proksima je vera manio de grandeco.

Do mi ĉiel estas kontenta ke s-rino P.K. ekiris en atako kontraŭ L. I. kaj igis nin konsideri pri nia afero. Kelkaj da ŝiaj deziroj estas deve divideblaj, kaj ne profitas al ni, ekzemple, tio ke al letero de estimata aŭtorino datita je 1. XI. 1900 oni povas respondi nur en marto 1901. Sed tie ĉi ankaŭ p. e. estas pekoj ne sole de l' administracio kaj la redakcio.

Sed kion ajn faru aŭ diru la nunaj esperantistoj, la ideo de lingvo uzebla en la tuta mondo estas ideo tutampleksanta kiu ne mortos, kaj se mortos, reviviĝos.

Poltava, III. 1901.

A. Z—v.

* Estas konsenteblo tamen ke la plej abomenaj faroj estas farataj sub la elpendaĵo de patriotismo. Ĉu oni ne eblas serĉi rimedon flanken de la kosmopolitismo malpli furioza?

Letero al la Redakcio.

Estimata Sinjoro Redaktoro!

Havu la bonecon presigi en L. I. tiun ĉi proteston de fervora sed bedaŭrinde ne »talenta« esperantisto, kiu neniam pretendos povi kunlaboradi en la gazeto Esperanta.

En la laste veninta numero de L. I. unu estiminda aŭtorino faris iajn elparolojn, kiuj devas alvoki kontraŭdirojn. Interalie ŝi certigis ke L. I. nun ne plenumadus inde sian rolon, sian antaŭdifinon kiel komuna organo de l' esperantista mondo. Ŝi laŭdas, en kontraŭo al la nuna, »mortinta« L. I., la eminentajn unuan L. I.-n kaj »Esperantisto«-n, kies kunlaborantoj estus la solaj, kiuj estus trovataj kompetentaj por kunlaboradi en tia gazeto. Post la tralego de tiu artikolo, mi dediĉis iom da mia nesuperflua tempo (mi estas »vilaĝano«: bienetuzisto), por travidi ĉiujn jarkolektojn ĝis nun aperintajn, kaj komparis la antaŭajn kun la lastajn. Ĉe tio ĉi al mi rezultigis, ke la du lastaj, »la mortaj«, jarkolektoj tute ne meritas tian severan juĝon! Nur la riproĉo pro la neakurateco de l' elirado de la kajeroj, manko komuna de ĉiuj kolektoj, estis justa. Tion ĉi lastan ni ĉiuj pardonu kaj esperu iom da »plibonigo«! Se estus eĉ la fakto, ke la gazeto malboniĝadas, tamen estus malkorekte ne reaboni! Ĉiuj esperantistoj ja opinias la gazeton necesa kondiĉo por la lingvo mem, kaj pro tio oni nepre devas senkondiĉe subapogi ĝin — tiom pli, ĉar ĝi tion meritas. Komparu ni ekzemple la svedajn popolkantojn kaj cet., kiujn tradukis tiel bonege Sig. Ag., kun tiaj, kiujn tradukis la merite glorata A. Kofman! Ankaŭ ni esploru senpartieme aliajn artikolojn kaj rakontojn! Ĉiu senantaŭjuĝa leganto dum tio devas konfesi ke la gazeto konstante progresas! Tiuj aŭtoroj, kiuj mallaŭdis la L. I.-n, volu instrui min kaj aliajn, en kiuj rilatoj la nuna gazeto estas »tro malforta«? Ĉu ne estus pli korekte, konfesante la meritojn kura-

ĝigi la redaktoron kaj nunajn kunlaborantojn ? Ili certe bonvenigus kore ĉiun el la antaŭaj kunlaborantoj ; kaj mi opinias ke estas la devo de tiuj ĉi »veni je helpo per siaj talentaj plumoj«. Mi tamen volas konstati, ke tio ĉi ne estas necesa por la valorigo de la gazeto L. I.

Koregajn salutojn !

K. Ĥinge, Svedujo, 5. III. 1901.

Nath. Kyhler.



Nomoj mutaj — mono surda — bruo surda-muta.

Estis iam homo, kiu volis krei al si grandan bibliotekon. Li akiris sufiĉan nombron da libroj. Sed li havis unu fiksan ideon : neniu libro devas esti pli dika ol je tri centimetroj. Tial li fortranĉis de ĉiuj pli grandaj volumoj la komencon kaj la finon kaj enbindigis ilin ĉiujn en tre helajn bindojn kaj ordigis ilin en multajn fakojn. Poste li sendis anoncantojn en la stratojn kaj en la oficejojn de la gazetoj por atentigi la homojn kaj venigi ilin por rigardi la bibliotekon.

Multaj alvenis kaj admiris la regnlecon de la fakoj kaj la estetikan impreson, kiun faris al iliaj okuloj la samgrandeco de la libroj.

Ĉiuj vizitantoj, eĉ tiuj kiuj nur havis la tempon preterpase enrigardi tra la pordo, estis demanditaj pri iliaj nomoj, kiujn la posedanto de la biblioteko enskribis en grandan libron. Tiun libron li eldonis poste sub la titolo : »Ĉiuj legis mian bibliotekon kaj ĝin aprobas.«

Kelkaj personoj, sciiginte kiel iliaj nomoj estis eksploatitaj, protestis, certigante ke ili nek legis nek aprobas. Sed la posedanto nur diris ke li havas iliajn nomojn kaj ilin bezonas ; li ja ne estas kulpa ke ili memvole rigardis lian bibliotekon ; tio estas tamen fakto.

Estis iam inter la centoj da kreantoj de mondlingvoj ankaŭ unu, simila al ĉiuj aliaj en ĉio escepte en tio ke li havis iom da mono kaj neniom da modesteco. Lia nomo estis Volap aŭ Blovat aŭ Volapak aŭ Volapaketo — ni ne bone memoras. La lingvon li nomis la lingvo Brua, ĉar — diris li — la bruon oni aŭdas tra la tuta mondo . . . se ĝi estas sufiĉe laŭta. Kaj li streĉis siajn pulmojn por fari la plej grandan bruon, sed — bedaŭrinde por li — oni ne aŭdis ĝin pli longe ol ĝis la proksima korto.

Estis iam verkisto de fabloj, nomita Esopo. Li skribis fablon pri la rano, kiu pensis ke, se ĝi plenvolas

sin multe, ĝi estos same granda kiel la bovo. Per la bovo (b. v. = mallongigo de »bona, vera«) li sendube volis diri Esperanton, kaj per la rano (nenia mallongigo, signifas sole »rano«, en la sama senco kiel en la svedaj frazoj »diri ranon«, »fari ranon«) li aludis la Bolakon.

Vi scias la sorton de la rano.

Al tiuj el niaj legantoj, kiuj havas sufiĉe da libera tempo ni rekomendas la studion de la lingvo Brua Bolak. Tio estas tre bona vojo por konvinkiĝi, kiel internacia lingvo *ne* devas esti konstruita kaj kiel *ne* propagandi ĝin.

Ni faris al ni la plezuron paroli pri la lingvo Blua (ha — jen ni ekmemoras : Blua estas la nomo), ĉar la naciaj gazetoj, al kiuj s-ro Bolak dissendis malavare sian dekfrankan verkon, parolis en la lastaj tempoj pri tiu lingvo Superflua — plej ofte kun akra kritiko. La plej akran kritikon tamen faras al si la lingvo mem.

Ni liveras ĝin per varma mano al via propra klera prijuĝo.

Ni preskaŭ forgesis tre gravan aferon. — Vi ne imagu al vi ke estus malfacile fariĝi Bolakisto. Ĉiu, kiu okaze montras sian modestan nomon al s-ro B. fariĝas Bolakisto : se botisto sendas al li kalkulon, li estas Bolakisto, se vi skribas al li por akiri lian verkon, vi estas tuj notita, kaj se vi skribas al li ke vi estas esperantisto kaj tute ne aprobas lian Bluan moŝton, tiam vi estos tuj kreita Bolakisto de la plej alta rango.

Mi mem preskaŭ estis notita per tio ke mi tion ĉi skribis.

P. Nn.

KRONIKO.

El Bulgarujo.

— La gazetaro. S-ro Ĥr. Popov kompleze sendis al ni la n-rojn 1-an kaj 2-an de l' gazeto „Novosti“, en kiuj estas legata daŭrigata serio da artikoloj pri la historio de lingvo internacia, verkita de li.

— Plovdiva Esperanta Klubo »Stelo« estis fondita la 15-an de februaro de tiu ĉi jaro. La urbo Plovdiv estas ankaŭ nomata Filipopolo. — La administranta komitato de la klubo havas la jenan konsiston : prezidanto Il. Bobĉev, viceprezidanto T. Kantarĵiev, sekre-

tario-kasisto G. P. Oreškov, konsilanoj Hr. Popov, D. Kostakev, T. Kanev kaj Aĥ Iĥsan.

La kunsido de la 15-a de febr. proklamis la sekvantajn personojn honorajn membrojn de la klubo: s-roj L. Zamenhof, L. de Beaufront, R. H. Geoghegan, Ch. Méray, P. Nylén kaj E. Lombard.

En la regularo oni trovas la rimarkon, ke kiam la fortoj de la klubo alkreskos, ĝi fondos sian propran organon, sed por nun ĝi sin servos per la lokaj gazetoj.

El Francujo.

— **Publika parolado en Dijono.** Laŭ n-ro 20 de l' gazeto „*Le Bien Public*“ (21. jan. 1901), kiun oni bonvole sendis al ni, s-ro Ch. Méray, tiu estimeginda kaj fervora apostolo de nia lingvo, faris publikan paroladon pri la korespondado internacia kaj la Esperanto la 16-an de januaro lasta en la granda amfiteatro de la Fakultato literatura de l' Universitato.

Aŭdantaro tre grandnombra kaj simpatia, entenanta multe da virinoj, sin interpretis sur la benkoj ĝis sur la ŝtuparoj de l' amfiteatro.

La dirita gazeto rakontas sufiĉe detale pri la enhavo de la parolado kaj eĉ donas multe da eliroj el la leteroj kaj poŝtaj kartoj, kiujn s-ro M. ekspoziciis kaj preparolis ĉe tiu okazo.

La rakonto, kiu okupas pli ol du kolonojn de la franca gazeto, finiĝas per tio, ke la parolado daŭris unu kaj duonan horon kaj laŭ la alestantoj impreson esprimitan per la aplaŭdoj unuanimaj kaj longdaŭraj, kiuj salutis la eliron de l' parolinto.

— **La lingvo internacia en la kampo de l' komerco.** La firmo Badet, Clément kaj K-io en Dijon (Côte-d' Or), Francujo, dissendis en la fino de l' jaro pasinta cirkulerojn en Esperanto pri sia kasislikvoro kaj siaj grandaj vinoj de Burgundo.

Speciale la nigrariba likvoro, nomata „*Crème de Cassis*“, estas rekomendata al ĉiuj.

Elŝanĝe de poŝta mandato aŭ deambio oni povas ricevi la likvoron, ekspedatan per poŝtaj paketoj, afrankite pri pakado kaj transporto en la stacidomon de l' ricevonto, por

3,50 frankoj en Francujo kaj por prezoj inter 4 kaj 5,50 fr. en aliaj landoj.

Oni povas mendi cirkulerojn de s-ro Joseph Badet.

*

Ankaŭ alia franca firmo dissendis cirkulerojn, en la aprilo lasta: Moreau-Voillot, en Beaune (Côte-d' Or), reprezentata de Jean Cyrot, pri siaj diversaj vinoj de Burgundo.

Por ricevi detalan prezaron oni sin turnu al la suprenomita reprezentanto.

*

Oni ne povas malvidi, kiel gravegaj por Esperanto estas tiaj aliĝoj de homoj la monan gajnon ankaŭ celantaj, ĉar tiaj personoj povas konstante Esperanton ĉien sendi kune kun siaj komercaĵoj kaj ĉiam doni al siaj kolegoj ekzemplon fari tion saman.

— Ĉe l' Akademio de l' Sciencoj.

Sub tiu ĉi rubriko en la aprila numero de l' *Espérantiste* ni legas la sekvantan, treege ĝojigan sciigon:

„Esperanto estas prezentita ĉe l' Akademio de l' Sciencoj, en la kunsido de la 9-a de aprilo, de Generalo Sebert. Tio estas, diras s-ro Méray, grandega fakto. Ni opinias absolute same. Jam ni vidas la rezultatojn.

Generalo Sebert, preparolinte la sciencan utilecon de helpanta lingvo internacia, poste insistis speciale pri Esperanto, kiu posedas ĉiujn ecojn postulatajn kaj kies uzo estas jam tre disvastiĝinta. Li prezentis diversajn dokumentojn kaj leterojn de s-ro Méray, korespondanto de l' Akademio, kiu estis jam antaŭe sendinta komunikaĵojn pri tio.

La komunikaĵoj de s-roj Sebert kaj Méray estis enpresitaj en la *Comptes rendus* (Raportoj) de l' *Académie des Sciences*. Tiamaniere, al la honoro de prezento oficiala antaŭ la plej alta korporacio sciencula de Francujo aldoniĝas por Esperanto la profito de bonega kaj grandega publikigado. Multaj gazetoj ĉiuspecaj kutimas doni resume raporton pri la kunsidoj de l' Akademio de l' Sciencoj; sekve en ĉiuj oni parolas pri la komunikaĵo de Generalo Sebert kaj pri Esperanto: la pri-skribeto estas plej ofte mallonga, vere; sed

almenaŭ tio konigas *favore* la nomon. Ni jam ricevis multajn gazetojn kaj revuojn, kiujn niaj amikoj ĝentile sendis al ni — interalie la *Journal officiel*, *La Nature*, k. t. p. — kaj kiuj tiel parolis pri Esperanto; la plena nomaro de ili estus tro longa por ke ni povu ĝin presi.

— **La gazetaro franca.** S-ro Sam Meyer havis la bonecon transsendi al ni la n-on 27 de „*Courrier de La Rochelle*“ (4. IV.), en kiu oni legas kun intereso artikolon, subsignitan *S. M.*, pri lingvo internacia kaŭze de broŝuro en tiu ĉi demando. La broŝuro dirita estas verkita de s-ro L. Couturat, doktoro literatura, delegato de la kongreso internacia de Filozofio. Li ne estas partiano de Esperanto, sed traktante ĝenerale la demandon li alvenas al la principoj, sur kiuj estas konstruita nia lingvo. — Tial *S. M.* uzas la okazon por montri al Esperanto, kiu certe estas la plenumo de la postuloj de s-ro Couturat.

— **Kurso de Esperanto.** La »Touring-Club« malfermis por siaj membroj kurson de Esperanto. Tiu kurso, kiu estas farata de s-ro de Beaufront, komencis lundon la 29-an de aprilo per parolado enkonduka; ĝi estos daŭrigata, dum unu monato, la lundon, merkredon kaj vendredon de ĉiu semajno, je la 1/2 de la 9-a horo de l' vespero.

El Svedujo.

— **La Klubo Esperantista en Stokholmo** la 6-an de marto havis sian unuan grandan kunvenon publikan de tiu ĉi jaro en la klubejo de l' societo »Studentoj kaj laboristoj«. La kunsidon prezidis s-ro C. E. Carlsson, kiu salutis per Esperantlingva parolo bonvenon al la alestantoj, precipe la gastoj el la novfondita vivoforta klubo Södertelja, kiuj entreprenis la vojaĝon el la najbara urbo aparte por ĉeesti la kunvenon.

Post la lego de l' protokolo de l' antaŭa kunveno oni elektis kontrolantojn de l' administrado de la jaro pasinta, nome: s-rojn J. E. Sandberg kaj E. V. Magnusson; kaj admi-

nistrantan komitaton por la nuna jaro, nome: prezidanton filozofia licenciato E. Etzel, vicprezidanton bankoficisto C. E. Carlsson, kasishton redaktoro A. Roswall, sekretarion polistico P. Ahlberg, helpantoj s-rinoj Fraenckel kaj Krikortz. Ĉiuj, ekster s-ro Sandberg, estas reelektitaj.

Laŭ antaŭa decido de la klubo la administranta komitato estis ricevinta la komision ellabori projekton de nova regularo. Tiu — kiel eble plej konforma al la regularo de S. p. p. Esperanto en Francujo — estis preta kaj antaŭmetata al la akcepto de la klubo, kiu metis la projekton sur la tablo por fine decidi en la venonta kunsido.

La sekretario s-ro P. Ahlberg prezentis en sveda lingvo revuon de la nuna disvastiĝo de Esperanto, kies belega formo kaj interesa enhavo kaptis la tutan atenton de l' aŭdantaro, kiu al fino montris sian plezuron kaj admiron per vivaj daŭraj aplaŭdoj.

Kuracisto d-ro S. E. Krikortz rakontis en parolo en la lingvo internacia iom pri siaj trovoj kaj spertadoj dum vojaĝo, kiun li faris en la aŭtuno lasta en Germanujo, Svisujo kaj Francujo. Kun plezuro li rememoris la kunestadon kun s-ro Lambert en Diĝono, per kies afableco li povis vidi kaj admiri la belaĵojn kaj historiajn restaĵojn de tiu. Malnova ĉefurbo de Bourgogne (Burgonj'). La du sinjoroj, per Esperanto fariĝinte amikoj, kunestis dum preskaŭ unu tago kaj interparoladis absolute senĝene nur per helpo de la lingvo internacia pri ĉio ebla, pri kio homoj povas ekbabili. Kaj tio malgraŭ ke s-ro Lambert neniam antaŭe havis okazon buŝe uzadi nian lingvon.

Egalajn spertojn s-ro Krikortz ankaŭ faris en Parizo, kie li aŭdis personojn, je la unua fojo parolantajn esperante, ne nur paroli korekte sed eĉ lerte kaj rapide. La tre malgranda diferenco de la elparolo neniel malhel-

petis la plenan komprenon. Kaj vere ne estis pli granda ol inter du dialektoj de la samnacia lingvo. Ekzemple, la sono *h* ne estas tiom laŭte aŭdita el la buŝo de franco kiom de ni skandinavo.

En Parizo s-ro Krikortz havis multajn okazojn elŝanĝi la francan lingvon je la internacia, kio, laŭ lia diro, estis por li faciligo kaj ripozo. Li ankaŭ per Esperanto helpigis en multaj cirkonstancoj. Aparte li dankis al Esperanto lian konatiĝon kun la grava popolinstrua movado en Francujo, »les universités populaires« (la universitatoj popolaj). Tio ĉefe ebligis per la pero kaj interesa kunestado kun la sekretario de la grupo pariza de S. p. p. Esp., s-ro Gabriel Chavet, tipo de inteligenta, sentema, interesiĝa franca studento.

En tiu grupo s-ro Krikortz ankaŭ dum kluba kunveno konatiĝis kun multaj aliaj fervoraj batalantoj por nia ideo en Parizo.

Kontraŭe li ne havis okazojn trovi esperantistojn en la ekspozicio. La vitromeblo de la societo Espero, kiu devus esti kuniga punkto en la vasta ekspozicia regiono, ne havis oportunan, facile troveblan lokon.

Resume s-ro Krikortz diris, ke li ne nur havis plezuron sed ankaŭ grandan utilon per sia kono de Esperanto, ankaŭ — kaj malgraŭ — posedante la »ĉefajn« lingvojn eŭropajn, forlasi dum tempeto la fremdan lingvon kaj esprimi siajn pensojn en Esperanto.

Post tiu ĉi ĉarma parolado la redaktoro de »L. I.« traktis iom la principojn de la sonoj kaj elparolado de Esperanto.

En la alestantaro, kiu plenigis la tutan salanon, sin trovis granda nombro da virinoj.

Inter la gastoj la fervora, energia prezidanto kaj kreinto de la Klubo Södertelja, juna tre simpatia viro, naskite aŭstro, distingis sin pro sia bonega scio paroli Esperante, kiun lingvon li pli bone posedas ol la svedan, —

kvankam li estadis en Svedujo multe pli da tempo ol en »Esperantujo«.

Kiam estis finita la oficiala parto de la kunveno, oni kunestis ĉirkaŭ taso da teo, kaj antaŭ la disiro oni kantis akompanate je fortepiano la Esperantajn tradukojn de la por svedoj konataj kaj karaj kantoj »Nordlando« kaj »Nia lando«.

— **La gazetoj kaj la kunveno de la Klubo Stokholma.** La grandaj ĉiutagaj gazetoj preskaŭ senescepte enhavis artikolojn pri la kunveno. La 7-an de marto oni legis en *Svenska Dagbladet* n-o 64, *Stockholms-Tidningen* n-o 3,423, *Aftonbladet* n-o 56, *Nya Dagligt Allehanda* n-o 56 pli-malpli mallongajn rakontojn pri la kunveno; kaj *Stockholms Dagblad* n-o 111 — en kies redakcio sin tovas s-ro V. Langlet — kaj *Vårt Land* n-o 56 — en kies redakcio estas la redaktoro de »L. I.« — enpresis po pli longa artikolo kun eltiro el la revuo de s-ro Ahlberg. Krom tio la du laste nomitaj gazetoj sciigis antaŭe pri la kunveno en la n-o 54 de »V. L.« kaj en la n-o 110 de »St. Dbl.«. Dank' al tiuj sciigoj kelkaj el la gazetoj sendis siajn proprajn rakontodonantojn al la kunveno.

Ĉiuj la gazetoj parolis serioze kaj bonvole pri nia afero.

— **Esperanto kaj la sveda sobriĝanaro.** En n-o 1 de »*Ledstjernen*«, oficiala gazeto por la Armeo de sobriĝistoj (15-an de jan. 1901), s-ro Vilhelm Norrléen skribis tre varman kaj entuziasman artikolon, per kiu li konsilas siajn samideanojn lerni Esperanton kaj disvastigi ĝin; kaj en tiu ĉi kunteksto li substrekas la rolon, kiun prenis la svedaj sobriĝistoj kiel la plej fervoraj disvastigantoj de Esperanto. La plej grava por ni estas lia sciigo, ke nuntempe en 23 lokoj de Svedujo kursoj pri Esperanto daŭras sole ĉe la goodtemplanoj.

— **Nova organo de Esperanto.** La gazeto „*Södertelje Tidning*“, eldonata en la urbo Södertelje en Svedujo, konsentis esti la organo de la esperantista societo en la dirita urbo. En ĝi estas presataj ĉiuvendrede sciigoj kaj artikoloj en kaj pri Esperanto. La gazeto eĉ portas senpere sub la noma vinjeto super la unua paĝo la informon, presitan per grasaj literoj, ke ĝi estas organo de la societo Esperantista de Södertelje. Ĝis nun la vendredaj numeroj enhavis tre interese skribitajn revuojn semajnajn, verkitajn de s-ro J. J. Süßmuth. Ankaŭ estas komencita en la kolono esperantista de la lasta paĝo kurso por komencantoj, redaktata ankaŭ de s-ro S. Se iaj esperantistoj deziras kuraĝigi la gazeton aŭ iel interesas sin por la enhavo Esperanta en ĝi kaj volas aboni la gazeton, ili turnu sin al ĝia redakcio sub la adreso: „Södertelje Tidning. Södertelje, Svedujo.“ Ĝi kostas por unu jaro 3,50, por duona jaro 2 kronojn svedajn.

— Societo Esperantista en Södertelje.

En la unua tago de tiu ĉi jaro la esperantistoj en la urbo Södertelje kunvenis kaj fondis novan societeton Esperantistan, kiun ili nomis „Unulingveco“.

Aliĝis tuj 20 homoj. Tiu ĉi nombro jam du- aŭ triobligis.

La administranta komitato konsistas en la sekvantaj: prezidanto J. J. Süßmuth, viceprezidanto V. Norrléen, sekretario Alb. Nyberg, kasisto J. Roseen, helpanto Axel Feldt.

Honoraj membroj de la societo estas elektitaj doktoro L. Zamenhof en Varsovio, universitata profesoro Karlo Méray en Dijono kaj ĵurnalisto Paul Nylén en Stokholmo.

La societo celas la disvastigadon de la lingvo internacia per la helpo de gazetoj, broŝuroj kaj kursoj. Jam de la komenco ĝi energie aliris la laboron kun tia fervoro, ke oni preskaŭ timas ian trostreĉigon. Ne estas nia intenco malkuraĝigi niajn fervoregajn kolegojn, sed ni ĉiam pensas, ke prudenta singardemo

neniam malutilis aferon, eĉ se ĝi ŝajne estis tro prudenta kaj tro singardema, kaj antaŭe pripensadi la faron farotan eĉ du fojojn kaj ankoraŭ la trian estas fine pli bone ol tri fojojn agi.

La nomo de la societo sendube ne estas prospera. Tia afero kiel nur nomo povas ja ŝajni negrava demando, sed tamen ĝi havas ankaŭ sian gravecon. La svedoj neesperantistoj ne scias elparoli la nomon, ili diras laŭ sia lingvo „unulingveko“, tion oni devus eviti, ĉar evito estus facila. Ankaŭ la ideo de „unulingveco“ ne estas nia unuigilo; ni eĉ deziras la multlingvecon de la naciaro — la ideo de lingvo internacia estas fundamentita sur la fakto, ke multaj diversaj lingvoj ekzistas kaj devas ekzisti. Oni povas diri kiel regulon ke ju pli konkreta estas nomo, ju pli rekte prenita el la praktikaj rilatoj, des pli bona kaj oportuna ĝi estas. La nomo per si mem povas altiri homojn aŭ repuŝi, kaj la plej sobra kaj praktika estas la plej bona por aligi la sobrajn, seriozajn homojn.

Ni uzis la okazon por eldiri tion ĉi, sen ian subpenson, kiel bonan konsilon el nia sperto.

La societo en S. jam havis multajn kunvenojn kaj Vesperojn Esperantajn. Ĝi havas sian propran organon, kiel ni rakontas en alia kunteksto de tiu ĉi numero.

Krom tiu aludita gazeto ankaŭ la *Gripen* enhavis diversajn artikoletojn pri la Societo kaj Esperanto, tiel en n-o 2 la 4 jan. 1901.

—**—

El Esperantujo.

— **Esperanto per la poŝto.** Sub tiu ĉi rubriko ni nomis, por la ĉiufanka traktado de la faktoj de la historio Esperanta, la propagandajn kovertojn kaj poŝtkartojn. Ni nomas nun plu: diversajn kovertojn kaj kartojn presitajn kaj uzatajn de s-ro Paul de Lengyel.

FELIĈO DE VIRINOJ.

(De A. Ĉĉĥov.)

Oni estis enteriganta general-leŭtenanton Zapupirin. De ĉiuj flankoj kuris scivolaj aroj al la domo l' mortinto, kie sonegis funebra muziko kaj militistaj ordonoj. Inter unu de l' grupoj, kiuj rapidis vidi l' elporton de la korpo, troviĝis du oficistoj Probkin kaj Svistkov. Ambaŭ venis kun siaj edzinoj.

— Posten! — haltigis ilin polica suboficiro kun bona kaj simpatia vizaĝo, kiam ili atingis la ĉenon. — Posten, se vin plaĉas! Sinjoroj, tio ĉi ne dependas de mi, mi petas malantaŭen! Cetere, la sinjorinoj povas trairi . . . Mesdames, antaŭiĝu trankvile, sed vi, sinjoroj, havu la bonecon repaŝi.

L' edzinoj de Probkin kaj de Svistkov ruĝiĝis pro la subita komplezeco de l' suboficiro kaj ekkuris tra la ĉeno. Iliaj edzoj restis en la ĉi-flanko de la viva muro kaj okupis sin je observado de dorsoj de piedirantaj kaj de rajdantaj gardistoj.

— Ili trairis! — diris Probkin postrigardante la forirantajn virinojn kun envio, preskaŭ kun malamo. — Kiel feliĉaj estas tiuj ĉi virinoj! La vira sekso neniam havas tiajn privilegiojn kiel ilia, la virina! Kian meriton oni trovas en ili? Ili estas, oni devas konfesi, la plej ordinaraĵoj kun ĉiaj antaŭjuĝoj, kaj oni ilin tralasis, dum nin, konsilistojn de etato, oni tenas tie ĉi.

— Kia argumentado, miaj sinjoroj! — diris la suboficiro, rigardante Probkinon kun riproĉo. — Se oni vin enlasus, vi tuj komencus puŝi sin reciproke kaj fari skandalon, dum virinoj, dank' al ŝia delikateco, neniam permesos al si tiaĵon.

— Kion vi diras? — ekkoleris Probkin. — La virinoj estas l' unuaj, kiuj ĉiun puŝas.

La viro staras senmove kaj rigardas unu punkton, dum la virino dismetas la brakojn kaj pelas ĉiujn ke oni ne ĉifonu al ŝi la tualeton. Kion mi havas ankoraŭ por aldiri? La virina sekso estas ĉiam privilegiata. La virinoj estas liberaj de militservo. En dancbalojn oni ilin enlasas sen pago. La tribunalo ne kondamnas ilin al vergpuno . . . Mi petas, kiajn apartajn indojn ili havas? Kiam fraŭlino faligas sian poŝtukon, vi devas ĝin levi; kiam ŝi eniras, vi devas cedi al ŝi vian seĝon; kiam ŝi foriras, vi devas ŝin akompani . . . Kaj la rangoj! Por atingi ekzemple la rangon de konsilisto de etato, la viro devas ŝviti daŭre la tuta vivo; kaj fraŭlino dum duonhoron edziniĝas kun konsilisto, kaj jen ŝi estas persono. Por fariĝi duko aŭ grafo, oni devus venki la tutan mondon, almiliti ŝipkon, estadi ministro, dum al ia Varinjo aŭ Katenjo — ke Dio min pardonu por la vortoj — sufiĉas turni la trenajn antaŭ grafo aŭ fari okuletojn, kaj ŝia grafina moŝto estas plene bakita . . . Jen, vi estas ekzemple sekretario de gubernemento; vi akiris tiun ĉi rangon, por tiel diri, per ŝvito kaj sango, kaj via Mariino Fomiŝna', kial ŝi estas kunsekretario? Provu fariĝi al ŝi vian servon, kaj vi vidos kiel ŝi skribos regnajn dokumentojn!

— Sed pro tio ĉi ili naskas infanojn en suferoj! — rimarkis Svistkov.

— Kia granda afero! Lasu nur ke ŝi ekstaru antaŭ l' estro, kiam li elspiras malvarmon, kaj la nasko montriĝos al ŝi plezurego. Ne, ĉiam kaj ĉie ili havas privilegion! Fraŭlino aŭ virino de nia klaso povas diri al generalo tian delikataĵon, kian vi timus balbuti eĉ al policano. Jes, via Mariino Fomiŝna' po-

vas kuraĝe iri brak-en-brako kun konsilisto de etato, kaj vi, provu fari la samon! . . . En nia domo, rekte sub mi, loĝas profesoro kun sia edzino. Li estas generalo, havas l' ordenon de Ano de l' unua grado, kaj malgraŭ tio oni aŭdas nenion ekster »malsaĝulo! malsaĝulo!«, kiel lin honoras l' edzino. Kaj, ne forgesu, ŝi estas simpla virino el burĝinoj! Cetere, ŝi estas lia leĝa edzino, kaj l' afero estas sekve fatale ordinare: de eterne estas skribite ke la leĝaj edzinoj insultu siajn edzojn. Sed rigardu la malleĝajn, kion ili al si permesas. Mi neniam malmemoros unu okazon, pro kiu mi estis tre proksima pereji, se la preĝoj de miĝaj gepatroj ne estus min savintaj. La pasintan jaron, ĉu vi memoras, nia generalo, ricevinte forpromeson, prenis min kun si, por helpi lian korespondadon. L' afero estis facilega: unu honron da laboro, kaj poste oni estis libera por promeni en l' arbaro aŭ aŭdi kantojn en la servantejo. Nia generalo estis fraŭlo; lia loĝejo — plenejo de ĉia bono; da servantoj-arego; sed edzino malestis, kaj por la mastrumado mankis ĝusta homino. La servantoj estis malordemaj, malobeemaj, kaj ĉiujn komandis ekonomiino Vera' Nikitiŝna'. Ŝi okupis sin je tepreparo, je manĝomendo kaj je riproĉegoj kontraŭ la servantoj. Tio ĉi estis virino abomena, venenoplena, kun malico de satano . . . Kiam ŝi iun insultis, ŝi faris tian bruon ke oni devis ŝtopi al si l' orelojn. Ŝia insultado ne tiel forte nin turmentis kiel ŝia krietado. Ho, Dio, ŝi venenis al ni la tagojn. Tiel ŝi sin tenis ne sole al la servantoj, sed ankaŭ al mi . . . Nu, mi pensis, atendu iom, mi elektos oportunan momenton, kaj mi ĉion rakontos al la generalo: li estas profundiginta en sian servon kaj ne vidas kiel ŝi lin ĉirkaŭŝtelas kaj pereigas liajn servantojn . . . atendu iom, mi malfermos al li l' okulojn. Kaj mi

malfermis ilin al li, jes! tiel bone mi ilin malfermis al li, ke malmulte mankis ke mi fermus miajn proprajn por eterne: eĉ nune mi sentas teruron, se mi rememoras ĝin. Unu fojon oni iras en la koridoro kaj aŭdas krietadon. En l' unua momento mi pensis ke oni buĉas porkon, sed, atente aŭdante, mi rekonas ke tio ĉi estas la voĉo de Vera' Nikitiŝna', kiu insultas. »Abomenulo! Kotulo! Diablo!« Kiu ŝi komplimentas? — mi pensas. — Subite, ho ĉiuj sanktuloj! mi vidas la pordon malfermiĝi, kaj el la ĉambro elfugas nia generalo, tuta ruĝa, kun l' okuloj eliĝintaj, kun la haroj kiel se la diablo ilin disblovis. Kaj ŝi krias posten al li: »Kotulo! Diablo!«

— Ne eble!

— Parol' de honoro! Mi diras al vi ke la sango leviĝis al mia kapo! Mia estro forkuris en sian ĉambron, kaj mi restis en la koridoro sen iom kompreni, kiel azeno. Simpla, malklera virino, kuiristino, nulo — kaj tio ĉi permesas al si tian parolon kaj similan agon! Nu, mi pensis, tio ĉi si signifas ke la generalo volis ŝin eksigi de l' servo, kaj ŝi, vidante, ke atestuloj malestas, uzis l' oportuncon por venĝi, kaj regalis lin laŭ sia plezuro: ŝi havis nenion por perdi, forlasante la servon. Mi eksplodis . . . Mi iris en ŝian ĉambron kaj diris: »Kiel ci arogantis, sentaŭgulino, teni tian parolon al tia altrangita persono? Ci pensas ke li, estante malforta maljunulo, ne havas defendantojn?« Kaj mi, ne meditante multe, metis sur ŝian dikan vangon unu sigelon, kaj poste alian. Mia Dio, kian kriegon ŝi levis! Mi malkovris l' orelojn kaj foriris en l' arbaron. Post du horoj mi vidas knabon, kiu kuras al mi renkonte. — »Volu iri al la sinjoro!« Mi iras. Mi venas. Li sidas malafabla kiel meleagro kaj ne rigardas min.

— »Kial vi revoluciigas mian domon?« diras li. — »Via generala moŝto, — respon-

das mi, — ĉu vi aludas Nikitiŝna'n? Sed mi volis vin defendi. — »Tio ĉi ne estas via afero, miksiĝi en fremdajn familiajn rilatojn!« — Ĉu vi komprenas? Familiaj rilatoj! Kaj li komencis prediki kaj prediki; li min tiel pikis, ke mi ne scias kiel mi ne mortis. Li parolis longe, murmuris sen fino kaj subite li ekridigis. — »Diru al mi, kiel vi povis tion? Kie vi trovis la kuraĝon? Mirinde! Sed mi esperas, mia amiko, ke ĉio restos inter ni... Via ekflamo estas komprenata, sed konfesu mem,

via plua loĝado en mia domo estas neeble. Jen kia okazo! Li miregis, kiel mi povis frapitan blovitan pavon! — Ŝi blindigis lin, la diablino! Regna konsilisto, kiu havas ordenon de l' Blanka Aglo, kiu mokas la tutan estraron, kaj li estas sklavo de virino! Sed... deprenu la ĉapelon, — oni portas la generolon. Ĉiuj sanktuloj, kiom da ordenoj! Mia Dio, kial oni lasis la virinojn antaŭen, ĉu ili komprenas ion en ordenoj?

La muziko eksonis.

El la rusa trad. A. Kofman.

Ĉu estas ver'?


Ĉu estas ver', ĉu estas ver'
Ke la printemp' revenas?
Hirundo ĝaja en l' aer'
Ĉe mia dom' promenas.

Mi scias — unu hirundet'
Ne faras la printempon,
Sed vekas ĝia dolĉ-pepet'
En mi la verdan tempon.

Tuj flugos ĝaja juna par'
Da birdoj al nov-nesto,
Kaj ornamig'os la arbar'
Per multkolora vesto.

Ridetas jam kun ĝaj-humor'
Violoj kaj lekantoj,
Kaj ĉhas jam en mia kor'
Verdetaj freŝaj kantoj.

Amiko.



LA MALŜLOSILO.*

Idilio en prozo.

(De Iv. Ev. Geŝev.)

La mondo estas maljuna, kaj mi estis juna.
La mondo diris al mi, ke la koro mia edzigos min, sendemande mian kapon, sed mi ne kredis. Mi estis juna, sed la mondo estas maljuna.

Juna mi estis, kaj instrua, kaj malriĉa.
Kaj mi revis virinon riĉan kaj instruitan.
Instruitan kaj riĉan mi revis mian virinon.
Sed en la mezo de tiuj ĉi revoj mi vidis du

* En la popolo oni kredas, ke, se iu trovos trifolion (*Trifolium*) kun kvar folietoj, kun ĝi li povas malŝlosi kaj ŝlositajn pordojn, kasojn kaj alion. Ĝin oni nomas »malŝlosilo« (*razkoviĉe*). Rim. de l' trad.

okulojn nigrajn simile je karbero, kaj du lipojn ruĝajn kiel frangoj. Kaj ĉirkaŭ la lipoj enĉizetoj, kiuj ekstremadis de ĝojo, kiam la lipoj ridetiĝis, sed perdiĝis, kiam la lipoj fermiĝis.

Tiuj ĉi okuloj, tiuj ĉi lipoj, kaj tiuj ĉi enĉizetoj apartenis al unu ĉarma fraŭlino, al la gracieca Lala. Ŝi estis vilaĝanino. La tuta ŝia riĉo estis ŝia beleco, la tuta ŝia instruo estis ŝia naiveco.

Naiva kaj bela estis ŝi, kaj mi amis renkontiĝi kun ŝi en la herbkampoj de ŝia vilaĝo, kien miaj faroj tiradis min ofte.

La herbkampoj estis enfine de l' rivero. La rivero estis enfine de l' arbaro. Malapud la rivero supre de l' arbaro sterniĝis, simile je grandaj verdaj tapiŝoj, la vilaĝaj laborkampoj. Tie ĉi kaj tie ruĝis la novplugitaj kampoj. En la alia flanko malproksime ĉe la horizonto bluiĝis Stara-Planina (Balkano). Kiam en la mateno la suno lumigis tiun ĉi ĉarman pejzaĝon, ĝia lumo je unu fojo kuradas kiel ora tremo super l' akvon kaj poste brilegas simile je diamanto sur la larmoj de l' matena roso. Bona freŝeco venas de l' rivero. Sur ĝia bordo verdiĝis dikaj herboj, kaj en alia flanko ruĝiĝis diverskolora trifolio. Tie ĉi elfajfis ia timigita alaŭdo, tie — iu sekretita perdriko. Afabla kiel la flaro de l' juneco venadas la delikata gusto de l' plena kun floroj herbkampo; dolĉe kiel la murmureto de l' amo venas la bleko de l' enamata kolombino. Ĉio estas plena kun vivo, ĉio kantadas de amo. Sur unu proksima arbo najtingalo kun kantoj amuzas sian edzinon. Malproksime ie ŝafpaŝtisto kantadas en ŝalmo sian amatinon.

En tiu ĉi riĉego de koloroj, sonoj kaj bongustoj mi por la unua fojo vidis Lala'n. En tiu ĉi riĉego mi amis interparoladi kun ŝi, kiam mia faro sendadis min en ŝian vilaĝon.

Kaj kiam mi ne havis faron en ŝia vilaĝo, mi tian eltrovis: io pli forta ol mi tiris

min al tiuj herbkampoj, kie mi povus vidi Lala'n.

Nur por vidi ŝin, por interparoladi malmulte kun ŝi. Ĉar mi revis virinon riĉan kaj instruitan.

Tiel same pri instrua kaj riĉa mi revis, kiam en unu tago denove mi vidis Lala'n en la vilaĝaj herbkampoj. Ŝi estis foriranta en la vilaĝon, kaj mi aliris al ŝi. Ni renkontiĝis kaj komencis paroladi. Kaj la suno bruladis, kaj la birdoj kantadis, kaj la floroj gustadis pli multe ol alia fojo.

Festo de l' naturo estis, ankaŭ festo por Lala. Neniam ŝi ŝajnis al mi tiom ĉi belega, tiom ĉi ĉarma, tiom ĉi gracieca.

Tiel gracieca kaj ĉarma kaj belega estis ŝi, ke mi nevole demandis min: Kial Dio donis serĉi ĉe la fraŭlinoj ankaŭ instruon, riĉon? Ĉu ne estas sufiĉe al ili nur la beleco?

Mi demandis min, ĉu ne sufiĉas al ili nur la beleco, kiam Lala interrompis de l' tero unu herbeton.

— Kio estas tio ĉi? — demandis mi.

Demandis mi ŝin kaj mi ŝin rigardis.

— Trifolio. Ŝajnis al mi, ke ĝi estas kun kvar folietoj, ke estas malŝlosilo, tial do mi derompis ĝin. Sed ne estas; ĝi estas kun tri folietoj. — Diris kaj ruĝiĝis pli multe.

— Kaj por kio bezonas vi malŝlosilon?

— Por ke mi trovu havon, — respondis ŝi.

— Kaj kun malŝlosilo ĉu nur havon oni trovas? — demandis sama mi.

— Oni malfermas eĉ fermitajn pordojn, — diris ŝi.

— Kaj ĉu oni malŝlosas ŝlositajn korojn? — demandis mi eĉ ankoraŭ unu fojon. Sed ŝi ne respondis.

— Mi aŭdis, — aldonis mi, — ke kun malŝlosilo oni povas malfermi ankaŭ ŝlositajn korojn.

— Certe? — demandis ŝi.

Demandis, sed pentiĝis kial demandi, ruĝiĝis ankoraŭ pli multe kaj tiel hontiĝis, tiel ekrigardis en malsupre, ke ankaŭ mi pentiĝis ke mi diris al ŝi tiun ĉi vorton.

Ni daŭrigis iradi. Lala konstante rigardis en malsupre, estis enpensita. Nek unu vorton mi povis eltiri el ŝia buŝo.

Nek unu vorton el ŝia buŝo, nek unu ekrigardon de ŝiaj okuloj. Ili estis turnitaj je la tero, ŝajnas ke ili serĉis ion en ĝi, ŝajnas al mi ke ili serĉis truon, por sekretiĝi, por sekretigi ankaŭ sian honton.

Tuj ŝi ekrigardadis en unu loko. Lala haltiĝis kaj por la dua fojo kliniĝis.

Kliniĝis kaj interrompis ion kaj leviĝis. La suno lumadis, kaj la birdoj kantadis, kaj la floroj gustadis. Kaj Lala leviĝis pli luma ol la suno, pli ĉarma ol la birdoj, pli gracieca ol la floroj. Kaj ŝia vizaĝo ruĝiĝis, kaj ŝia brusto leviĝis pro unu mira sopiro. Kaj du larmoj, similaj je du perloj, lumegis en ŝiaj okuloj.

Du larmoj, similaj je du perloj, lumegis en ŝiaj okuloj, kaj ŝi diris al mi:

— Mi pensas, ke nun mi trovis la malŝlosilon. — Diris al mi ŝi kaj montris al mi unu trifolion kun tri ordinaraĵoj folietoj kaj kun kvara, malgranda kaj ĉarma, simile je la elĉizeto de ŝia lipo. Kaj kun solenanta ekrigardo de pura venkantino ŝi ĵetis tiun ĉi malŝlosilon ĉe mian bruston, ĉe mian koron.

Kaj mi rememoris miajn vortojn — la malŝlosilo malŝlosas la korojn — kaj mi ekrigardis Lala'n.

Ŝi ploris. Kaj mi vidis ke ŝi ploras de ĝojo. Kaj tiuj ĉi okuloj, kaj tiuj ĉi larmoj, kaj tiu ĉi amo al mi, kiu tiel ĉi forte eksplodis, tiel efikis al mia koro ke mi forgesis instruon kaj riĉon kaj ĵuris al Lala, ke ŝi estos mia.

Kaj mi plenumis mian vorton, — Lala hodiaŭ estas mia.

Ni edziĝis kaj estas feliĉaj. Nek unu ventego mallumigis nian sunon, nek unu serpento venenigis nian paradizon. Kaj mi ne revas jam pri riĉa kaj instruita virino, kaj Lala ne serĉas malŝlosilon por trovi kun ĝi havon. Kaj ni kune estas kun ĉio konsentaj, en unu ni ne konsentas sin. Ŝi ankoraŭ pensas, ke mia koro estis malŝlosita de l' malŝlosilo, kaj mi ankoraŭ pensas, ke ĝi estis malŝlosita de ŝiaj okuloj, de ŝiaj larmoj, de ŝia amo.

Kaj mi estas ankoraŭ juna, kaj la mondo estas maljuna. Sed kredas mi, ke la koro ofte edzigas homon, sendemande lian kapon.

Kaj mi kredas ankoraŭ, ke la koro bone faras, ne demandante ĉiam la kapon. Sed mi ne konas, ĉu en tio ĉi la mondo estas konsenta kun mi.

Eble, ĝi ne estas konsenta. Kiu scias? Mia aĝo estas tiel diferenca de la ĝia! Ĝi jam de longa tempo estas maljuna, kaj mi estas ankoraŭ juna...

Tradukis el bulgara lingvo C. R. esp. 4912.

DIVERSAĴOJ.

— **Malfacilaŭdemeco.** Riĉa Sinjorino, kiu estis kuracita per la Artaj Oreltamburoj de D-ro Nicholson, donacis al la Instituto la sumon da **Kr. 25,000**, por ke surdaj aŭ malfacilaŭdemaj personoj, kiuj ne havas la rimedojn akiri tiajn, ricevu ilin senpage. — Le-

terojn oni volu adresi al: *Instituto Nicholson, Longcote, Gunnersbury, London, W.*

Informejo de esperantistoj.

Mi deziras korespondadi kun alilandanoj: Hispanoj, Portugaloj, Bulgaroj, Svisoj kaj aliaj; al ĉiuj skribontaj al mi, mi respondos. Ĉia alilanda letero en lingvo Espe-

ranto servas al esperantisto kiel tre bonega ilo por disvastigo; tiaj leteroj estas argumentoj pri Esperanto. Mia adreso: Russie. St. Rahni-Lesovije, gub. Podolskaja, kontora Spikovskaja, I. E. Moskovčenko.

HUMORAĴO.

La filo (10 jara, reenvenante el la cirko, al sia patro): La fortegulo havas ja nur unu kolon, kaj ĝi estas tute simila al la kolo de aliaj homoj, ne al la kolo de muso, kiel vi diris.

La patro: Ĉu vi frenezetiĝis, mia filo? Mi ja ne diris tion ĉi?

La filo: Ho jes, kara patro, — vi parolis en la cirko pri liaj muskoloj.

Antaŭ kelkaj tagoj mi renkontis mian amikon Matiason, portantan malgrandan pakajon.

Post reciproka interŝanĝo de salutoj mi demandas:

— Kio estas en via pakajo?

— Ho, io tre ŝatinda: malgranda peco da alt-ranga pastro.

— ?

— Jes, pap—ero . . .

Rebusoj.

De *Josefo Miletz.*

I.

i	ĉ
st	

II.

li
ma t

De

III.

	'	a	
---	---	---	---

IV.

— De *S. Poljanskij.* —

Kio bezona estas por gratulo?

V.

— De *Paul de Lengyel.* —

27	17	12	8	11	21	28	3	13	26.	Festo.
20	15	25	14.							Fluidajo.
10	9	15	13	11	22	15	23.			Lumigilo.
11	3	27	17	22	9	1	13	26		Lingvo.
16	5	20	12	8	4	19	27	14.		Jarparto.
25	22	7	6	28.						Vazo.
9	16	18	20	10	23.					Monato.
24	2	21	5	11	8	9	18	20	23.	Oficisto.
9	24	13	18	23	15	14	19	20	28.	Scienco.
13	22	7	19	16	17	8	14			Muzikilo.
4	27	20	24	25	28	27	26			Pastro.
1—28.	Aktuala admono.									

La solvojn de tiuj ĉi rebusoj ni presos en la n-ro 8. Ni petas tiujn inter la legantoj, kiuj sin interesas pri tio, ke ili alsendu la solvojn al la administracio de nia gazeto. La nomojn de la solvintoj ni presos kune kun la solvoj mem.

Oni povas ankoraŭ ensendi la solvojn de l' rebusoj trovataj en la n-ro 1 kaj 2—3—4.



Mi estas subite bategita de kruela malfeliĉo: la plej maljuna el miaj filoj mortis hieraŭ matene en miaj brakoj. Li estis 18-jara.

Dijon (13, rue Ch. de Vergennes), la 13-an de majo 1901.

F. Lallemant.

LA NOMARO

de ĉiuj nun riceveblaj verkoj de la literaturo Esperanta sin trovas en la broŝuro N^o 140 (Adresaro, serio XXI); oni povas ricevi tiun ĉi broŝuron ĉe

D-ro L. Zamenhof

(Varsovio, str. Dzika N^o 9) sendinte ĝian koston aŭ per mono (45 centimoj kun transsendo) aŭ per signoj de poŝto de kia ajn lando (60 centimoj).

MI KOLEKTAS

uzitajn eksterlandajn poŝtmarkojn. Mi do petas la amikojn Esperantajn, ill volu sendi tiajn al mi. Mi estas preta je rezervoj, oni nur skribu, kiamaniere mi povas fari tion ĉi.

Josefo Miletz

poŝtoficisto,

Budapest, IX., Dandár-u. 26. I. 12.
Hungarujo.

Finlandaj esperantistoj,

kiuj intencas akiri amatorajn fotografiajn aparatojn, estas petataj observi, ke tiaj, kune kun necesaj hemiaĵoj kaj uziloj, estas akireblaj ĉe ni je moderaĵ prezoj, krom kio al esperantistoj estas permesata rabato da 5%.

Postulu kostotabelojn!

Jyväs kylän Rohdoskauppa

en Jyväs kylä.